



**Bonvenon al la vikinga centro!
Tervetuloa viikinkikeskukseen!
Välkomna till vikingacentret!**



Malkresko de la membraro kiel defio al UEA p. 4
♦ Aŭtunaj Tagoj – Syyspäivät 14.–15.9.2013, p. 12–16
♦ Ĉu "Esperant-" aŭ "esperant-"?, p. 21

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanpaja.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 24 e/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 330

Kansi/Pärm/Kovrile: *Carola Antskog* & päällikkö/hövdingen/ĉefo *Paul Wilson*. Foto: Klerfonte.

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihteerii/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314, tiina.kosunen945@gmail.com
Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com
Jukka Nikoskelainen, Pohjolankatu 11, 20100 Turku. ☎ 050 525 3745 ✉ juknik@utu.fi
Keith (Keke) Uber, Poutapolku 3 B 30, 02110 Espoo. ☎ 040 413 4252 ✉ keith_uber@yahoo.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi
Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de
Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Danske Bank 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

Lingvo estas unu elemento

Ni esperantistoj defendas idealojn de paco kaj harmonia kunlaboro inter homoj kaj inter nacioj. Ni pensas, ke lingvo estas grava distinga faktoro kaŭzanta malpacon inter homoj. Sekve ni emas aserti, ke diverslingveco estas fonto de malakordoj, eĉ malamikeco; se ne la sola, se ne la plej grava, tamen tre grava fonto.

Sed komplikajoj ne eksplikas simpligo. Lingva diverseco povas esti faktoro, sed ĉu ĝi eksplikas la estiĝon de la grandaj interŝtataj militoj en la 20-a jarcento? Certe ne. Milito estas ago por preni aŭ konservi privilegiojn. Tiaj privilegioj ĉiam estis materiaj. Eŭropo frontis antaŭ cent jaroj krizon de kresko kolonia kaj industria. Ŝtatoj ne kapablis kreski interne per plua evoluigo de siaj soci-ekonomioj. Kolonioj estis dividitaj inter ŝtatoj, ties riĉaĵoj efike utiligitaj en la Eŭropa industrio, kies produktiveco malegale dividiĝis, kies merkato ne sufiĉis. Milito estas la plej efika industrio, kiu rapide cirkuligas materion, laboron kaj homojn. Materio disipe, laboron produktante detruon, homojn per kruela buĉado. Sed! ankaŭ redividante privilegiojn, kiujn iuj al si proprigas.

Lingva diverseco kaj antaŭjuĝoj, miskomprenoj, reciproka nekono ja havis kaj havas rolon en estiĝo de konfliktoj, kiuj povas fariĝi armitaj bataloj, eĉ longedaŭraj militoj. Tiu rolo estas en tiu malkleriga, simpliga, demoniga propagando, kiun militcela politiko nepre bezonas. Tia nacionalismo havas nenion komunan kun pozitiva, komunece harmonia, krea konstruado de nacio, kio inkluzivas ankaŭ kreon de komuna lingvoformo. Ni havis la bonŝancon fari tion dum la 19-a jarcento, kiam solidiĝis la finna lingvo kaj evoluis la Finnlanda socio dum longa paca periodo.

Dum imperiismajn militojn inter ŝtatoj oni povas karakterizi grandskala industrio, civilaj militoj povus esti komparataj kun naciaj kaj regionaj ekonomioj. En tempo de stabila progreso ĉiuj rajtas partopreni produktadon kaj sekve havi sian parton el ties fruktoj; perturboj kaj malstabiligo forprenas tiujn eblecojn – homrajton sin vivteni per propra laboro – de malpli kapablaj unue kaj parte de ajnaj aliaj poste. Tion ni konas en nia lando, kie nin pro-

tektas longa tradicio de demokratio kaj ĉiuokaze forta materia baza strukturo. Tiu strukturo estas konstruita kun la principo, ke ”tero ne pride- mandas, kiun lingvon pluganto parolas”. Lingvogrupoj vivas kune kaj kunkompreniĝas, kaj fipropagando por malpacigi ilin ne havas sukceson.

Enlandaj, civilaj konfliktoj havas aliajn originojn ol lingvajn, sed kiam aperas kaj akriĝas tiaj konfliktoj, ties partioj ekuzas disigilojn kulturajn, etnajn, historiajn, kaj tiuj disigiloj inkluzivas la lingvan aspekton. En Eŭropo la plej terura el ili post la grandindustria mondmilito, la dispecigo de Jugoslavio, tion montras. Nacionalismo ne toleras komunan serbokroatan lingvoformon. Sed tiu re-distancigo de sudslavaj lingvoj estas sekvo, ne fonto. – El la aktualaj konfliktoj la civila milito en Sirio estas ĉiam pli grava kun pli ol centmilionoj mortintoj kaj milionoj da rifuĝintoj. La 22-miliona popolo scias kaj uzas la araban simile kiel ni la finnan: Lingvo sciata kaj aprobata ankaŭ de minoritatoj (en Sirio maksimume 10 procentoj) kunigas, eĉ legoscio estas relative alta, 80 procentoj. Sed duonjarcento kiel kolonio kaj alia duono, lastaj 50 jaroj, en maldemokratio (malgraŭ formala parlamentismo) kreis tian sistemon de privilegioj, ke por konservi sian pozicion tro multaj pretas al sangoverŝado.

Antaŭkristnaske en ”prediko” mi skribis pri roloj de landoj en la mondo kaj esprimis la esperon ke Finnlando havu daŭre rolon de kuracisto prefere ol juĝisto. Nia lando por sia bonŝanco ne havas kolonian historion nek tro grandan rolon en la nuna tutgloba ekonomio, do ne kolektis multan misfamon. Kaj nia internacia lando, Esperantujo, daŭre havu famon homaranan.



Tuomo Grundström

Osmo Buller: Malkresko de la membraro kiel defio al UEA

En la Vintraj Tagoj de EAF (16.–17.3.2013) la ĝenerala direktoro de UEA
Osmo Buller prelegis pri la evoluo de la membronombro de UEA.
Jen resuma artikolo pri la prelego.

La plej okulfrapa fenomeno ĉe UEA dum la lastaj jaroj estas la malkresko de la membraro. Ĝi tamen ne okazis egale en diversaj landoj kaj mondopartoj. En riĉaj landoj la malkresko estis granda. En triamondaj landoj la membraro kreskis kaj povus kreski eĉ pli, se pli da membriĝemaj esperantistoj povus pagi la kotizon.

La tabelo montras la evoluon de la membraro en UEA ĝenerale kaj en Finnlando aparte ekde 1950 ĝis 2012. En Finnlando okazis sentebla falo: la nombro de individuaj membroj (IM) pasintjare (105) estis nur 44% de la nombro en 1950 (239). La falo estus eĉ pli drasta, se oni komparus 2012 kun la jaroj, kiam UK estis en Finnlando: 353 en 1969 (UK en Helsinko) kaj 324 en 1995 (Tampere), sed tiu komparo ne estas adekvata.

Se ni ignoras la kongresajn jarojn kaj konsideras nur la “normalajn” jarojn, ni vidas kreskon de finnaj UEA-membroj ĝis 1970, kiam ili estis 280. Poste tiu nombro ne plu estis atingita krom en la Tamperea jaro 1995. En 2000 la membronombro falis sub tiun en 1950. En 2003 ĝi estis precize 200. Poste la falo plu daŭris, ĉar membroj maljuniĝis kaj mortis, dum apenaŭ alfluis novaj membroj.

La evoluo de la aligitaj membroj (AM) de UEA en Finnlando sekvis la saman tendencon. EAF fariĝis landa asocio de UEA en 1955. Ekde tiam ĝi devas ĉiujare pagi al UEA etan kotizon por ĉiu membro de EAF, kiu ne estas individua membro de UEA. En 1955 EAF anoncis al UEA 12 tiajn membrojn kaj en 1956 nur 2. En la jaroj 1957–1960 EAF anoncis neniun aligitan membron. Rigardante la sumojn de IM kaj AM

Finnlando	1950	1960	1969	1970	1980	1990	1995	2000	2010	2012
IM	239	273	353	280	249	238	324	222	123	105
AM	-	-	-	200	470	603	336	185	204	181
Sume	239	273	353	480	719	841	660	407	327	286

UEA	1950	1960	1969	1970	1980	1990	1995	2000	2010	2012
IM	5 723	7 194	7 111	6 847	6 629	7 645	7 237	6 583	5 288	5 046
AM	8 988	22 991	26 472	26 490	27 554	25 224	13 808	12 522	10 527	10 057
Sume	14 711	30 185	33 583	33 337	34 183	32 869	21 045	19 105	15 815	15 103

IM = individuaj membroj de UEA

AM = aligitaj membroj (tiu membro de landa asocio, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA)

oni vidas la malmultiĝon de la organizitaj esperantistoj en nia lando.

Pri UEA ĝenerale la bildo estas malpli drama, ĉar en 2012 ĝi havis pli-malpli same multe da membroj kiel en 1950. Survoje estis tamen diversaj evoluoj: estis du periodoj kun pli ol 7 000 IM (nun ĉ. 5 000) kaj longa periodo kun ĉ. 25 000 AM (nun ĉ. 10 000). La nombro de AM kolapsis post la ŝanĝoj en Orienta Eŭropo, kies landaj asocioj perdis siajn subvenciojn kaj ne plu povis pagi al UEA por miloj da membroj. Oni povas miri, kiel bone UEA tamen konservis la plej grandan parton de sia membronombro. SAT estis iam pli-malpli same granda, sed nun ĝia membraro estas apenaŭ dekono de IM de UEA. Heroldo de Esperanto konkurencis iam kun la revuo Esperanto pri la nombro de abonantoj, sed nun ankaŭ ĝi ŝajne falis al dekono kaj eble eĉ ĉesis aperi. La pozicio de UEA kiel la ĉefa reprezentanto de la parolantoj de Esperanto estas tute klara. La ekstera mondo cetere, UN kaj Unesko ĉekape, agnoskas tion jam de longe, tenante oficialajn rilatojn nur kun UEA.

“Politike korekta” klarigo pri la membrara falo estas, ke pro la interreto homoj ne emas membriĝi nek partopreni en kunvenoj nek aboni paperaĵojn. Tiel estas, sed tio ne klarigas ĉion, ĉar la malkresko komenciĝis antaŭ la reta epoko. Temas pri tio, ke la nombro de esperantistoj malkreskis. Malfeliĉe ni ne scias, kiom da esperantistoj nun estas kaj eĉ malpli, kiom da ili iam estis. La malmultiĝon de esperantistoj oni povas konkludi ankaŭ el tio, ke pro la malkreskinta merkato vendiĝas malpli da Esperantolibroj, okazas malpli da Esperanto-renkontiĝoj kaj ilia partoprenantaro ŝrumpas, kaj diversaj Esperanto-centroj, -kursejoj kaj -feriejoj malaperis. Verŝajne malpli da homoj lernas nun Esperanton ol antaŭ la reta epoko. Oni lernas ĉefe rete, sed la nombro de retaj lernantoj ne atingas la iamajn nombrojn. Fakte ankaŭ en la pasinteco granda parto de esperantistoj lernis mem la lingvon. Nun retaj lernantoj anstataŭas ilin, sed samtempe tradiciaj kursoj kaj studrondoj preskaŭ malaperis.

La malpli amasa lernado de Esperanto sekvas el la populariĝo de la angla, kiu estas preskaŭ ĉie instruata kiel la unua fremda lingvo kaj kiu ankaŭ ĝenerale trudas sin tra ĉiu truo en la nuna socio. En la pasinteco oni ankoraŭ povis pensi, ke la ĝenerala akcepto de Esperanto estas reala kaj povus okazi relative baldaŭ. Tio en si mem instigis eklerni ĝin kaj aliĝi al ĝia movado, sed nun apenaŭ iu ajn plu pensas tiel. Tamen, anstataŭ komenci ĉi-loke filozofumi pri la ŝancoj de Esperanto defii la anglan en estonteco, mi nur citas *Bertolt Brecht*: La certajo ne certas. Kiel estas, ne restos.

Oni ofte renkontas la aserton, ke nun plej multaj agadoj okazas ekster UEA, kaj tial UEA ne allogas. Tio klarigas nenion, ĉar ĉiam estis tiel kaj en tio estas nenio malbona, eĉ male. Manka kono de historio estas komprenebla ĉe novuloj, sed estas strange, ke foje eĉ iuj, kiuj partoprenas en la movado jam de longe, kvazaŭ perdis pecojn el sia memoro. Multo en la funkciado de UEA estas malkontentiga kaj eĉ postrestinta. Plibonigoj tamen ne ĉiam estas facile realigeblaj, ĉar proponoj pri ŝanĝoj ofte konfliktas inter si kaj ĉiu estas ĝisoste konvinkita pri sia pravo. Ekzemploj estas la diskutoj pri la retejo de UEA kaj pri la revuo Esperanto. Kroma problemo estas, ke la diskutojn regas eŭropanoj, kiuj probable atendas de UEA ion alian ol ne-eŭropanoj. UEA fariĝis pli tutmonda laŭ sia membraro, sed tio ankoraŭ ne aperas en la diskuto pri la estontaj vojoj de la Asocio. Verdire povus esti utile, se dum iom da tempo la eŭropanoj restus malpli laŭtaj.

Nun UEA pretiĝas por elekti novajn gvidorganojn, precipe la novajn prezidenton kaj Estraron. Estas nur unu kandidato por la prezidanteco: *Mark Fettes*, kaj ne malfacilas prognozi, ke li estos elektita. Mi esperas, ke kun li kaj lia teamo revenos iom de la entuziasmo, kiun oni spertis dum unu-du jaroj post la lanĉo de la Manifesto de Prago en 1996. Fettes estis la aŭtoro de tiu dokumento, kiun 14000 esperantistoj subskribis. Ĝi naskiĝis kadre de Kampanjo 2000, kiun iniciatis prezidanto *Lee Chong-Yeong* kaj kiu

vigligis la movadon por ioma periodo. Similan elanon oni poste ne plu spertis en UEA. Ankaŭ la nova Strategia Plano, akceptota ĉi-jare, havas la saman ĉefaŭtoron kiel la Manifesto de Prago. Ĝi nur estas tro ampleksa, por ke multaj legu ĝin, sed espereble oni scios distili el ĝi konkretan agadplanon, kiun ĉiu komprenos kaj en kiu ĉiuj trovos almenaŭ unu eron, kiun ili sentos proksima al si kaj por kies realigo ili pretos ion fari.

La lastatempaj membrostatistikoj ne servis por krei viglan etoson en UEA. Al la nova Estraro do la granda tasko venki la apation kaj levi la

mensojn. Por atingi tion ĝi devos konduki antaŭ la membraro unuece, ĉar nenio subfosus la reputacion de la estraro pli ol publika disonanco inter ĝiaj membroj. Malbonaj ekzemploj el freŝa pasinteco ne mankas. Ni esperu, ke la Estraro trovos la ĝustan ŝnuron, kiun ĝi tiru, por ke eksaj membroj komencu reveni kaj novaj aperu. Ni ne scias la nombron de la parolantoj de Esperanto en la mondo, sed ili estas multe pli multaj ol la membraro de UEA. Potencialo por kresko ekzistas, eĉ por rapida kresko.

Osmo Buller

Kvartaga kurso en Esperanto-Gastigejo Fyradagarskurs på Esperanto-Gården

La tradicia somera kursaro de Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors, Svedio, okazos 14–17 julio 2013. Partoprenantoj povos ankaŭ alveni pli frue aŭ resti pli longe.

Lertaj instruistoj, i.a. *Nataša Bertse*, kiu gvidos la konversacion kaj kantadon; pri la kurso por infanoj respondecos Anna Ritamäki-Sjöstrand.

Esperanto-Gården i Lesjöfors i Sverige erbjuder årets sommarkurser 14-17 juli. Det är möjligt att anlända tidigare och stanna längre.

Kursoj/Kurser:

- por infanoj / för barn
- por komencantoj / för nybörjare
- daŭriga / fortsättningskurs
- konversacio, stilo kaj gramatiko

www.esperantogarden.se
s13@esperanto.se, tel. -46-590-309 09

Anna Ritamäki-Sjöstrand
+358-50-370 3146



Alternativa MOJOSejo

Semajno pri alternativaj temoj kaj por junuloj vegetara aŭ vegana manĝo de sabato, 20-a ĝis sabato, 27-a de julio 2013. Plena programo en www.gresillon.org/s3

Proponu vian prelegon pri iu alternativa temo!

Vidu ankaŭ: Festa Semajno por junaj familioj kun infanoj. Farado de maskoj kaj manpupoj. Ludoj, banado, manlaboroj, sporto, muziko kaj E-kursoj de sabato, 3-a ĝis sabato, 10-a de aŭgusto 2013, programo en www.gresillon.org/s4

Kore, Jännick
sekretario de la Esperanto-Kultur
Domo Gresiljono

Esperanta Retradio – la ĉiutaga aŭd-vida servo!

”Esperanta retradio” havas novan retejan adreson:
<http://esperantaretradio.blogspot.co.at>

”Esperanta Retradio” estas unika kaj tre interesa aŭd-vida servo, kiu ĉiutage aperigas novan 3–6 minutan son-dosieron kun aldono de ĝia skribita teksto! Tiu solvo ebligas ne nur simple ĝui la enhavon de la sondokumentoj, sed ĝi povas tre efike helpi al instruado kaj ekzercado de la lingvo: se oni ne komprenis iun fragmenton aŭ esprimon per orelo, oni povas retrovi ĝin en skriba formo per la okulo. Tre utila solvo kaj por kursanoj kaj por ekzercantoj!

”Esperantan Retradion” iniciatis aŭstra esperantisto *Anton Oberndorfer*, lastatempe al ĝia kompilado aliĝis helpantoj el Israelo, Brazilio kaj Pollando. La regulaj ĉiutagaj elsendoj funkcias ekde 26-a de 2011, ĝis nun estas faritaj pli ol 970 sondokumentoj, do post ĉ. 1 monato ni povos gratuli la funkciigantan teamon je la 1000-a ”elsendo”!!

Laŭnhave la temoj de la elsendoj estas tre variaj: inter ili troviĝas tagaj interesaĵoj, notoj pri mondaj aktualaĵoj, sciencaj novaĵoj, kaj malofte eĉ E-movadaj temoj.

Lastatempe – danke al *Gian Piero Savio* – la tradician son-formaton ofte kompletigas ankaŭ mallongaj kaj bonkvalitaj filmetoj, kiuj igas la retejon eĉ pli interesa!

Pro fermo de la ĝisnuna retejo ekde majo Esperanta Retradio havas novan adreson:
<http://esperantaretradio.blogspot.co.at>
 Listo de ĉiuj antaŭaj elsendoj estas trovebla ĉe:
<http://aldone.de/retradio>

Gratulon kaj dankon pro tiu servo al Anton Oberndorfer, kaj al la kunlaborantaj teamoj!

Szilvási László, L.S.

La lasta elsendo temas pri la hodiaŭa rolo de diversaj asocioj, kaj ĝi iom tuŝas ankaŭ Esperantan temon:

Asocioj perdis signifon
 - fragmento -

”...La granda epoko de la asocioj estas evidente pasinta.Ankaŭ por la celo disvastigi Esperanton montriĝas ke la asocioj apenaŭ povas plenumi tiun sian taskon. Asocioj funkcias laŭ siaj propraj leĝoj, internaj aferoj ofte estas multe pli gravaj ol la ekstera agado, sed ili pretendas por si iun statuson de oficialeco. Tiu imago pri oficialeco fariĝas granda memtrompo kiu malebligas kunlaboron kun aliaj laŭcelaj iniciatoj.

En Esperantujo la grandaj asocioj jam delonge lamas. En ili la internaj aferoj kaj problemoj regas la vivon de la asocio. Ilia produktivo do estas ege malalta. La strebado al oficialeco malrapidigas ĉion. La lingvo povas nur kreski de malsupre, la praktikado, tio estas parolado, estas unuaranga. Por akceli tion asocioj apenaŭ povas kontribui. Sed ili povus almenaŭ elstarigi la gravecon de la parolado kaj kuraĝigi adeptojn de Esperanto paroli la lingvon en publika kunteksto por atingi laŭeble multajn homojn tiel portante la lingvon al ili.

La Esperanta Retradio kiel tute privata iniciato akcelas pli bonan paroladon de Esperanto per ĉiutagaj ekzemploj de parolata lingvo.”

Aŭskultu la tutan elsendon ĉe: <http://esperantaretradio.blogspot.co.at> (rimarku la eblon aldoni komentojn al ĉiuj artikoloj!)

L.S. / Ret-Info (www.facebook.com/Ret.Info)

La Dua Tutmonda KER-ekzameno okazis laŭplane



Partoprenantoj de la ekzameno (de maldekstre starante) Paula Niinikorpi (**loka organizanto**), Kari Pyykkö, Tapani Aame, Sylvia Hämäläinen, Arja Kuhanen, Tuomo Grundström, Raita "Saliko" Pyhälä, (**sidante**) Tiina Kosunen, Carola Antskog kaj Robert Bogenschneider (**helpanto**). Fotis Irina Skladnova.

Ĉi-jare la ebleco ekzameniĝi pri Esperanto dum la Dua Tutmonda Ekzamentago kolektis 250 kandidatojn el 16 landoj. La ekzamenoj okazis la 8an de junio en 24 lokoj, inter kiuj estis Helsinki en Finnlando kun siaj 8 kandidatoj. Sep urboj en Francio kaj po du en Meksiko kaj Brazilo bonvenigis la eblecon ekzameni dum la tago. Aliaj ekzamenlokoj estis en Argentino, Belgio, Germanio, Japanio, Kolombio, Nikaragvo, Pollando, Rusio, Serbio, Svedio, Svislando kaj Usono.

Pasintjare dum la Tutmonda Ekzamentago

okazis nur skribaj sesioj, sed ĉi-jare lige al la Tago estis ankaŭ parolaj sesioj en ses urboj. La distancajn ekzamenojn ebligas la uzo de modernaj teknikaĵoj, per kiuj la kandidatoj estas ligitaj kun la du ekzamenantoj per videokonferenca sistemo. La parola parto okazis en la francaj urboj Liono kaj Limoĝo jam vendrede la 7an de junio kaj paralele kun la skriba parto okazis ankaŭ parolaj ekzamenoj en *Arras* (Francio) kaj *Técamac* (Meksiko). En *La Chaux-de-Fonds* kaj en Tuluzo la parolaj sesioj disvolviĝos la 15an kaj la 21an de junio.

La junia ekzamensesio estis la 34a en la serio de KER-ekzamenoj. Kun ĝi la nova ekzamen-sistemo nombros jam 1 300 kandidatojn. Pli-aj ekzamenoj dum la proksimaj monatoj estos dum la ILEI-konferenco en Herzberg, dum la UK en Rejkjaviko kaj dum la Itala Esperanto-Kongreso en Kastelaro.

La 8 kandidatoj de la sesio en Helsinki estas kontentaj kun la ebleco ekzameniĝi kaj ĉio paŝis akurate. Dum la suna kaj varma somera tago la kandidatoj ŝvitis en la ekzamenosalono, sed mi deziras al ĉiuj sukceson kaj pozitivan rezulton.

*Paula Niinikorpi, la loka organizanto,
pljparte laŭ gazetaraj komunikoj de UEA*

Elektronika versio abonebla

Por iri kun la tempo, kaj provo eventuale ŝpari superflujajn kostojn, la estraro de EAF decidis eksperimenti kun elektronika versio de Esperantolehti dum la numeroj 4 kaj 5.

Tuj kiam la numero iros al la presejo, ankaŭ abonantoj ricevos ligilon, de kie la PDF-forma dosiero estos elŝutebla kontraŭ sciigota persona

pasvorto (ne publike uzebla).

Se vi interesiĝas ricevi E-lehti en PDF-formato – tio eblas aldone aŭ anstataŭ la papera versio –, sciigu vian retadreson al la redaktoro (bogi@uea.org), kun indiko de la nomo(j) kaj ĉu anstataŭ aŭ aldone al la papera numero. Por aliaj nenio ŝanĝiĝos.

El la Akademio de Esperanto

Oficialaj Informoj numero 20 je 27.4.2013

Elekto de triono de la akademianoj

Okazis en la unuaj monatoj de ĉi tiu jaro la re-elekto de triono de la akademianoj laŭ la Statuto de la Akademio de Esperanto.

Ne rekandidatis *Marc Bavant, Gbeglo Koffi, Xie Jū-ming.*

Iliajn lokojn kaj tiujn de la forpasintaj kolegoj prenis la novaj akademianoj *Marek Blahuš, Rudolf Fischer, Aleksander Melnikov, Tsvi Sadan,*

Nguyen Xuan Thu, Usui Hiroyuki, Edmund Grimley-Evans, Harri Laine kaj *Ranganayakulu Potturu.*

Estis reelektitaj *Marjorie Boulton, Michel Duc Goninaz, Anna Lowenstein, Carmel Mallia, Sergio Pokrovskij, Otto Prytz, Amri Wandel, John Wells.*

La estraro de la Akademio de Esperanto

Nun la Akademio konsistas el 44 membroj:

<i>Vilmos Benczik</i>	<i>Edmund Grimley-Evans</i>	<i>Jouko Lindstedt</i>	<i>Carlo Minnaja</i>	<i>Alexander Schlafer</i>
<i>Gerrit Berveling</i>	<i>Paul Gubbins</i>	<i>François Lo Jacomo</i>	<i>Paŭlo Mojajev</i>	<i>Tsvi Sadan</i>
<i>Marek Blahuš</i>	<i>Lena Karpunina</i>	<i>Anna Lowenstein</i>	<i>Brian Moon</i>	<i>Saka Tadasi</i>
<i>Marjorie Boulton</i>	<i>Christer Kiselman</i>	<i>Ma Young-tae</i>	<i>Nguyen Xuan Thu</i>	<i>Humphrey Tonkin</i>
<i>Renato Corsetti</i>	<i>Boris Kolker</i>	<i>Carmel Mallia</i>	<i>Barbara Pietrzak</i>	<i>Usui Hiroyuki</i>
<i>Marcos Cramer</i>	<i>Iлона Koutny</i>	<i>Stano Marček</i>	<i>Sergio Pokrovskij</i>	<i>Amri Wandel</i>
<i>Probal Dasgupta</i>	<i>Katalin Kovats</i>	<i>Geraldo Mattos Gomes</i>	<i>Otto Prytz</i>	<i>John Wells</i>
<i>Michel Duc Goninaz</i>	<i>Erich-Dieter Krause</i>	<i>dos Santos</i>	<i>Baldur Ragnarsson</i>	<i>Bertilo Wennergren</i>
<i>Rudolf Fischer</i>	<i>Harri Laine</i>	<i>Aleksander Melnikov</i>	<i>Ranganayakulu Potturu</i>	<i>Yamasaki Seikō</i>

Kial ĵurnalistoj interesiĝu pri Esperanto?

La prelego "Kial ĵurnalistoj interesiĝu pri Esperanto?", kiun *Kalle Kniivilä* faris en la 38-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 27-an de aprilo, estas nun spektebla en la Reta Kinejo de UEA. La prelego estas ankaŭ legebla, ĉar ĝia teksto aperis en "Libera Folio". Tiu reta ĵurnalo, kies redaktoro *Kniivilä* estas ekde ĝia komenco, iĝis dekjara du semajnojn antaŭ la Malferma Tago.

Kniivilä, mem profesia ĵurnalista, donas multajn ekzemplojn pri la sinteno de ĵurnalistoj al Esperanto-rilataj aferoj. Tion li sondis per enketo, kiun li faris inter siaj kolegoj, demandante pri pluraj konkretaj aferoj, ĉu ili estas sufiĉe interesaj por ricevi spacon en gazeto. El la respondoj *Kniivilä* faras konkludojn kaj konsilojn pri tio, kiajn aferojn indas proponi al ĵurnalistoj por publikigo. Sekve, la prelego

estas leciono pri informado pri Esperanto al la ekstera publiko.

La filmo estas realigita de *Francisco L. Veuthey* kaj daŭras 48 minutojn. Krom la prelego, ĝi inkluzivas ankaŭ la diskuton kiu sekvis la prelegon. Ankaŭ la alia prelego de *Kniivilä* en la Malferma Tago, "Kial esperantistoj interesiĝu pri ĵurnalismo?", estis registrita por la Reta Kinejo.

Vimeo: <http://vimeo.com/67428233>

Youtube:

<http://www.youtube.com/watch?v=7F9rSdJhi8c>

Teksto de la prelego:

<http://www.liberafolio.org/2013/kial-esperanto-interesu-ĵurnalistojn>

(laŭ GK 501)

Budapeŝto 12.–16.5.2013

La flugo al Budapeŝto de Helsinki daŭras iom pli ol 2 horojn, sed kun la veturado al/de la flughavenoj buse, trajne aŭ aŭte tio tamen plilongiĝas al 5–7 horoj. Feliĉe miaj gastigontoj *Júlia* kaj *Sándor*, venis al *Ferihegy*, la flughaveno de B., por akcepti min kaj veturigi min al sia hejmo en Buda. Ili loĝas ĉe ĉarma kvietata strato *Kisköre*, kiun ombras altaj folioarboj. La loĝejo situas en la plej supra etaĝo (3a) sub la firsto. Tial la fenestroj situas oblikve en la plafono, kio estas malkutima en Finnlando. En la vivĉambro troviĝas multaj verdaj plantoj, eĉ arboj, al kiuj la lumo ne mankas. Tio kreas agrablajn etosojn.

La sekvan tagon vizitis nin s-ro *Geza Kurucz*, emerita redaktoro kaj fondinto de la gazeto *Juna Amiko*. Li kunportis la plej novan numeron kaj kelkajn nigrablankajn numerojn de la gazeto de ĝiaj unuaj jaroj. Kun plezuro ni interparolis. Júlia surtabligis por ni bonan tagmanĝon.

En ideala unua vetero Júlia kaj *Sándor* vizitigis al mi la vidindaĵojn de sia urbo: fortikaĵo, marcipanmuzeo, botanika ĝardeno... (Dum iu antaŭa vizito mi jam vidis la Parlaŭmentojn kaj Agrikulturan muzeon kaj iun Artmuzeon.) Mi nun rajtis senpage veturi en tramoj kaj busoj, ĉar mi havas pli ol 70 jarojn. Tio multe plifaciligis la rondveturadon. Mi vidis nekredible multajn arkitekturajn kaj skulpt-artajn kreaĵojn de la antaŭaj jarcentoj, turistarojn, parkojn kun mirinde grandaj foliarboj kaj floroj, diversajn pontojn, la faman Danubon, kiu kelkloke profundas 3–4 metrojn kaj aliloke dekon da metroj. Almenaŭ en la centro kie ni rondiris, la stratoj estis sen rubaĵoj kaj la promenantoj sur ili pli sveltaj ol en Finnlando. Surprizis min, ke nenie mi vidis gemaljunulojn kiuj bezonas "rollator"-apogilon por marŝi. La loĝantaro de Budapeŝto (2,6 milionoj) egalas preskaŭ duonon de tiu de tuta Finnlando, kaj la diametro de la urbo estas ĉ. 30 kilometroj. La tramoj kaj busoj diligente trafikis, ĉiam plenaj, sed tamen en la pinthoroj privataj aŭtoj jen kaj jen kaŭzas obstrukcojn, ĵamojn.

Unu fojon aliĝis al Júlia kaj mi ŝiaj lernantinoj-samklubaninoj *Kati* kaj *Vilma*. Kvarope ni vizitis trietaĝan riĉan vendohalon. En la subtera etaĝo fiŝegoj kaj maraj produktoj, konserviĵoj en vitraj ujoj, tra kies travideblaj flankoj ridetis al mi diverskoloraj paprikoj kaj aliaj legomoj. Multo estis tia, kian mi neniam antaŭe vidis, ekzemple la grandaj fiŝkapoj starigitaj en kesto, siluroj kaj aliaĵoj, kies nomojn mi ne scias en la finna nek Esperanto. En la teretaĝo estis sternita bunto de legomoj kaj fruktoj. Ankaŭ el ili mi ne ĉiujn scias nomi. En la supra etaĝo estas vendataj ĉiaj tablotukoj, porcelanaĵoj, vitraĵoj, suveniroy, manĝaĵetoj. Kati aĉetis por mi "langos", ia varma dika mola patkuko, sur kiun mi rajtis elekti la kovraĵon. Mi elektis miksaĵon el migdaloj kaj mielo kaj aliajn ingrediencojn, kies nomojn mi ne memoras. Oni manĝis starante aŭ sidante ĉe tablo, dum preterpasis daŭra fluo de turistoj kaj budapeŝtanoj. Mi aĉetis nur lignajn turbon kaj du ornam-ovojn. Dufoje mi aŭdis eĉ finnan lingvon. Ŝajnis, ke samtempe kun mi dekoj da finnoj vizitis la hungaran ĉefurbon. En la flughaveno, atendante en vico antaŭ la kontrolistoj, mi aŭdis ilin laŭdi la belan urbon, la banejojn, la malaltajn prezojn, la tutan sukceson de sia vojaĝo. Mi kaŝridetis, ĉar mia vojaĝo estis eĉ pli bona por mi, kvankam alispeca ol iliaj vojaĝoj.

Budapeŝto estas konata i.a. pro siaj banejoj. Ni vizitis la vestiblon de unu. La plafonon ornamis pentraĵoj, apud muro staris impona statuofontano antikvo-stila. Mi iom konatiĝis kun la broŝuro. La banoj kaj trinkado de la kuraca akvo helpas al multaj malsanoj kaj korpaj misordoj, sed oni devas zorgeme elekti, ĉar ili ne konvenas al ĉiuj, male, ili povas malutili al homoj, kiuj havas kormalsanojn, altan sangopremon aŭ aliajn difektojn aŭ al gravedulinoj.

Júlia kaj mi estis invitataj al mia kara E-instruistino *Eva Farkas* en *Dohány*-strato, kie mi loĝis ĉe si antaŭ 20 jaroj. Ŝi afable akceptis nin, proponis kafon kaj teon kun kukaĵetoj. Mi ĝojis

revidi ŝin kaj ŝian lernoĉambron, kie ĉiuj objektoj havas sur si slipon kun klare videbla Esperanta substantivo. Ŝi daŭre instruas ekzemple studentinojn, kiuj bezonas aldonajn poentojn por sia altlerneja/universitata diplomigo. Pro kromlaboro en la oficejo aŭ la infanoj eble malsanaj hejme la virinoj ne ĉiam povas partopreni regulajn kursojn sed bezonas elastan horaron. Eva loĝas en domego konstruita ĉirkaŭ fermita kvadrata kortego, kie lumo abundas. La loĝantoj povas havi florojn kaj verdajn plantojn sur la laŭmuraj irvojoj gardataj de bele forĝitaj nigraj balustradoj.

Okazis klubkunveno, kie fama fotisto ne-esperantista montris siajn fotojn pri somera finna kamparo rakontante pri ĉio en la hungara. Interpretis *Anna Besenyei*. Mi ludigis du kantojn el la kantaro de la Tamperea UK (1995), la ĉeestantoj havis antaŭ si la multobligitajn vortojn kaj kelkaj kunkantis. Mi iom ĥaose parolis pri Finnlando, kio nun hontigas min, sed mi ne antaŭsciis, kiom longe mi parolu kaj pri kio precize. Mi iom rakontis pri la klimato, prezoj, lernejoj, kostoj. Se vi pensas, ke unu eŭro egalas al 260 forintoj, vi povas imagi diferencojn. Mi ne volis elbuŝigi longajn frazojn en vortostoko, al kia lernantoj ne ankoraŭ kutimiĝis. Tiu plano mia ne estis taŭga, ĉar ĉeestis ankaŭ eminentaj Esperantoparolantoj, kiaj *Giorgio Silfer*, *Anjo Amika* kaj aliaj, kies nomojn mi ne kaptis. En la fino ni frandis buterpanojn, salaton kaj trinkaĵojn kunportitajn de Vilma kaj Kati. La ĉefino de la Kulturdomo venis danki min en la angla. Bonŝance mi kapablis respondi. Kiel donacojn de miaj geamikoj mi ricevis muelitan sekan paprikon, tablotukon, spicherbojn, ŝaŭmvinon, ĉokoladaĵetojn. (Vino aŭ aliajn likvaĵojn oni ne rajtas havi en sia va-

lizo en la aviadila pasaĝerejo. Mi devis ĵeti en rubujon poteton de paprikopureo, kiun mi estis aĉetinta pro peto de mia filino.)

La lastan tagon Sándor veturigis nin al *Örbotyan*, vilaĝo kie situas ilia ĝardeno. En ĝi multaj plantoj, precipe la arboj kaj arbustoj, al mi estis nekonataj, sed mi rekonis almenaŭ la fraĝojn kaj tomatojn. Júlia kaj Sándor akvumis la soifantajn plantojn el sia propra puto. Ĝenerale dirite la somero kaj varmo en Hungario jam estis kiel ĉe finnoj en julio. Ĉe ili floris kaj fruktis plantoj, kiujn ni devos atendi ankoraŭ 1–2 monatojn! Poste ni vizitis la kastelon *Gödöllő*, kie siatempe loĝis ekzemple la Reĝino *Sissi* sed kiu poste servis ankaŭ kiel bazo por ĉasado kaj en la 20a jc kiel maljunulejo kaj milithospitalo. Nun la kastelo estas bele restaŭrita/-ata, la laboro daŭras.

Vespere miaj gastigantoj reveturigis min al Ferihegy. Pro la trafikaj obstrukcoj tio fariĝis longdaŭra, iom labirinta vojaĝo, pro kiu mi ege dankas. (Sándor bezonis lerton, paciencon por elturniĝi. Estis eraro akcepti tian servon de la gastigantoj.)

En Helsinki la aviadilo surteriĝis je 00.40. Mi vane atendis dum duonhoru buson por veturi al trajno kaj hejmen. Nur poste mi sciiĝis ke la ŝoforoj strikas. Mi hejmeniĝis je la 2a nokte post unuhora taksivojaĝo, kiu kostis 84 eŭrojn. Tro ekscitita por dormi mi legetis kaj ordigetis ĝis mateno. Jam je la 3a komenciĝis la tagiĝo, sed en la plej norda Finnlando la suno jam ne subiras sed lumas dum la tuta diurno ĝis la fino de julio. Tre danko mi estas pro la Budapeŝtaj travivaĵoj.

Raita Pyhälä

Freŝa rekordo: 3000 kantoj en la Libera Esperanto-Kantaro!

Kiel rezulto de multjara agado, en la vikia kantaro troveblas jam tekstoj de 3000 Esperanto-kantoj!

Iniciatinto, ĉefa laboranto kaj multjara motoro de la projekto estas *Aleksej (Ljoŝa) Kuzne-*

cov, ka2pink@gmail.com, el Rusio. Gratulojn kaj sincerajn dankojn al li!

Adreso: <http://kantaro.ikso.net/>
L.S. / Ret-Info (www.facebook.com/Ret.Info)

Aŭtunaj Tagoj – Syyspäivät 14.–15.9.2013

Kasnäs, Kimitoön – Kemiönsaaren Kasnäsin kylpylässä
INSULARA NATURO KAJ VIVO – SAARISTOELÄMÄÄ



Ĉi-foje nin alvokas la bela insula komunumo *Kimitoön* (finne: Kemiönsaari), kies plej pinta loko estas la insulo *Kasnäs*. Tie situas banejo Kasnäs (Kasnäs bad, Kasnäsin kylpylä), kie okazos Aŭtunaj tagoj de EAF 14.–15.9.2013. Tiuj kiuj deziras povos alveni jam vendrede 13.9. kaj ĝui ekde tiam pri la bela pejzaĝo. Vidu la ekzaktajn sciojn de Salo-klubo kiel atingi la lokon. Sabate ni konatiĝos unue kun geologia pado kie eblas promeno tra 2 300 milionoj da jaroj kaj poste vizitos arĝentan atelieron. Je la tagmezo estos ekveturo ŝipe al la Vikinga Centro de *Rosala*, en kies interesa kaj ekzotika atmosfero ni ekscios pri la vikinga vivo. Ankaŭ lunĉon de la tago ni ricevos tie.

Post reveno al Kasnäs eblas naĝado en banejo kaj piedrado en la ĉirkaŭaĵo. Post la vespermanĝo membroj de Salo-klubo prezentos surprizan programon al ni. Dimanĉe okazos matene podia diskuto gvidata de *Tuomo Grundström* kaj *Börje Eriksson* pri aktualaj temoj en Esperantujo. Post la lunĉo ni faros multflankan rondveturon en Kimitoön, kompreneble kun esperantlingva ĉiĉeronado. Ni vidos la hejmon de *Amos Anderson*, bienon *Söderlångvik*, kaj konatiĝos kun multaj aliaj lokoj veturante en la buso. Fine ni estos en la centro de Kimito kaj vizitos la mezepokan ŝtonan preĝejon. El busstacidomo de Kimito ekveturos busoj reen al direktoj de Helsinki aŭ Turku.

Syyspäivät kutsuvat meidät tällä kertaa *Kemiönsaarelle*, jonka kauimmaisien kärki on nimeltään *Kasnäs*. Siellä sijaitsee Kasnäsin kylpylä, jossa Suomen Esperantoliiton syyspäivät ovat 14.–15.9.2013. On mahdollista ja toivottavaa tulla jo perjantaina 13.9. nauttimaan kauniista saaristomaisemista. Salon Esperantoseuran kutsusta selvää tarkemmin miten Kasnäsiin pääsee.

Lauantaina ohjelmassa on tutustuminen Sini-simpukan luontokeskukseen kylpylän läheisyydessä. Geologinen polku johdattaa meitä 2 300 miljoonan vuoden ajan ja voimme vierailla myös hopea-ateljeessa. Puolenpäivän aikoihin lähdemme veneellä Rosalan Viikinkikylään, jonka jännittävässä ja mielenkiintoisissa maisemissa vietämme loppupäivän. Lounas on myös viikinkihenkinen. Kasnäsisä on ennen illallista ja iltaohjelmaa aikaa käyttäen kylpylän palveluja tai liikkua lähiseudun luonnossa. Illallisen jälkeen luvassa on Salon klubin järjestämä yllätyksellinenkin illanvietto. Sunnuntaina tutustumme kiertoajelulla laajemmin Kemiönsaareen, opastus on enimmäkseen esperantonkielinen. Käymme mm. Amos Andersonin kotimuseossa, Söderlångvikissa ja näemme muita mukavia paikkoja. Lopuksi vierailemme Kemiön kirkossa, jonka muurarimestari Petrus Murator kutsuttiin aikanaan Turun tuomiokirkon holveja rakentamaan. Kemiöstä pääsemme taas bussilla Helsingin ja Turun suuntaan.

Kiel atingi Kasnäs?

Kuinka Kasnäsiin pääsee?

La Esperantoklubo de Salo bonvenigas vin al la banejo de Kasnäs en Kimitoön-Kemiönsaari por la semajfino 13.–15.9.2013. Ni rekomendas ke ni uzu la kolektivian trafikon, ĉar dimanĉe ni tuj post la lunĉo forlasos la lokon per luita aŭtobuso al Kimito, 40 km de Kasnäs, kaj ne reiros tien.

Ĉiujn itinerojn sur paĝo 14 priservas la firmao *Vainion liikenne*. Tio signifas ke oni jam en la unua buso povas pagi por la tuta vojaĝo al *Dragsfjärd*, kie la busoj alvenos ĉ 20 minutojn post la foriro de Kimito. Bedaŭrinde post la somero neniu aŭtobuso iros rekte al Kasnäs, do

ni devas iel aranĝi la transporton el *Dragsfjärd*. Tial estas bone scii kiam vi venos.

Salon Esperantoseura toivottaa kaikki tervetulleiksi Kemiönsaarelle Kasnäsin kylpylään viikonlopuksi 13.–15.9.2013. Suosittelemme, että tulette linja-autolla, koska sunnuntaina lähemme lounaan jälkeen kiertoajelulle, joka päättyy Kemiön keskusta.

Vainion liikenteen linja-autoaikataulut ovat s. 14. Matkan voi maksaa perille Dragsfjärdiin saakka jo ensimmäisessä bussissa. Bussimatka Kemiön keskustasta Dragsfjärdin kirkolle kestää noin 20 minuuttia, sen jälkeen järjestämme



ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 13./14.–15.9.2013 en Kasnäs, Kimitoön

Nomo: _____

Adreso: _____

Telefono (portebla): _____

Ret-adreso: _____

Aliĝkotizo:

15 e ĝis 30.6.2013 _____

20 e ĝis 15.8.2013 _____

25 e poste _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

AT-paketo 14.–15.9.2013 _____ **85 e** (lunĉoj, vespermanĝo sabate, ekskursoj al Rosala kaj Kimitoön)

AT-tranoktejoj paketoj (po persono)

13.–15.9.2013 (2 punktoj en baneja hotelo kun matenmanĝo kaj naĝado)

_____ **98 e** (3-lita ĉambro)

_____ **120 e** (2-lita ĉambro)

_____ **170 e** (1-lita ĉambro)

14.–15.9.2013 (1 punkto en baneja hotelo kun matenmanĝo kaj naĝado)

_____ **54 e** (3-lita ĉambro)

_____ **65 e** (2-lita ĉambro)

_____ **90 e** (1-lita ĉambro)

Entute pagenda al la konto de EAF:

Pagoj al la konto:

F111 8000 1700 2308 25, BIC:DABAFIHH

Bv. uzi la VT-referencnumeron **4640** (ne skribu aliajn informojn kiam vi ĝiras la monon)

Mi alvenas per buso nro _____ el Helsinki/Turku

Mi venos per propra aŭto _____

Pri alveno mi informos poste _____

Pliaj informoj aŭ deziroj:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando,
Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi

BONVENON!



muun autokyydin perille Kasnäsiin. Valitettavasti linja-autot eivät enää tänä kesänä aja Kasnäsiin. Tarvitsemme siis kuljetuksen järjestämistä varten tiedon itse kunkin saapumisajasta.

Busoj vendrede – bussiaikataulut perjantaina:

- 1) Helsinki 14.00 (Turku 15.25, šanĝo/vaihto en Kimito centro 16.45)
- 2) Helsinki 16.00, (šanĝo/vaihto en Salo 17.45) Turku 17.30, (šanĝo/vaihto en Kimito 18.40)
- 3) Turku 18.45 (el Helsinki 17.00, šanĝo/vaihto en Paimio 19.25 + Kimito 20.05)
- 4) Turku haveno/satama 20.30, busstacio/linja-autoas. 20.55 (Helsinki 19.00, šanĝo/vaihto en Piikkiö 21.15, Kimito 22.00)

Busoj sabate – bussiaikataulut lauantaina:

- 5) Turku haveno/satama 8.10, busstacio/linja-autoas 8.25 (Helsinki 6.00, šanĝo/vaihto en Piispanristi 8.35, Kimito 9.40)

Busoj dimanĉe – bussiaikataulut sunnuntaina:

Ohjelman jälkeen/Post la programo Kimito/Kemiö > Hki 15.55 (18.40) > Turku 16.05 (17.20). Se vi volas pli profunde konatiĝi kun la centro de Kimito eblas foriri je 19.00 (alveno al Tku 20.15, haveno 20.25 kaj Hki 22.35).

Informu aliĝante kiamaniere kaj kiam vi venos. Kontaktiĝu kun Carola aŭ kun Tiina se io estas malklara. Notu ke se iu volas veni pli frue, ekzemple jaŭde, eblas tranoktado ĉe Carola en Källkullen, Brokärrvägen 89 (10 minutojn per buso post Kimito centro).

Muista ilmoittaa milloin ja miten olet tulossa. Tarkempia tietoja bussiaikatauluista ja muusta saa Carola Antskogilta ja/tai Tiina Oit-tiselta. Carolan luona Källkullenissa voi myös yöpyä torstain ja perjantain välisen yön, jos haluaa tulla jo aikaisemmin.

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville 13./14.–15.9.2013 Kemiönsaarella, Kasnäsin kylpylässä.

Nimi: _____

Osoite: _____

Puhelin (kännykkä): _____

Sähköposti: _____

Ilmoittautumismaksu:

- 15 e 30.6.2013 asti _____
20 e 15.8.2013 asti _____
25 e 15.8.2012 _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

AT-paketti 14.–15.9.2013 ___ 85 e (lounaat, illallinen lauantaina, retket Rosalaan ja Kemiönsaarella)

AT-yöpymispaketit (hlö):

13.–15.9.2013 (2 yötä kylpylähotellissa, sis. aamiaisen ja kylpylän käytön)

- ___ 98 e (3-h huoneessa)
___ 120 e (2-h huoneessa)
___ 170 e (1-h huoneessa)

14.–15.9.2013 (1 yö kylpylähotellissa, sis. aamiaisen ja kylpylän käytön)

- ___ 54 e (3-h huoneessa)
___ 65 e (2-h huoneessa)
___ 90 e (1-h huoneessa)

Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton tilille:

Tilinumero: FI11 8000 1700 2308 25,

BIC: DABAFIHH

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Tulen bussilla nro ___ Helsingistä/Turusta

Tulen muulla kyydillä ___ Ilmoitan myöhemmin ___

Lisätietoja ja/tai toivomuksia:

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto

Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse eafmendoj@esperanto.fi

TERVETULOA!



Aütunaj Tagoj – Syyspäivät

14.–15.9.2013

PROGRAMO – OHJELMA

Tranoktejo, majoitus: Kasnäsin kylpylä

Ŝanĝoj eblas. Pri bushoraroj, rigardu la informon de Salo-klubo. Sekvu la retpaĝojn de EAF kaj informiĝu ĉe la aranĝantoj.

Muutokset mahdollisia. Bussiaikataulut täsmennyvät syksyllä, katso tarkemmat tiedot tekstistä. Ajankohtaiset tiedot saatavissa Suomen Esperantoliiton nettisivuilta tai yhteyshenkilöiltä.

Vendredo/Perjantai 13.9.2013

14.00 (ekde) Alveno al Kasnäs banejo por tiuj, kiuj mendis 2-noktan restadon. Vespere libera kunestado kaj kontaktiĝo en la areo. Vespermanĝo havebla proprakoste en la restoracio (antaŭmendo ne necesas).

14.00 lähtien Saapuminen Kasnäsin kylpylään pitemmän oleskelun varanneille. Illalla vapaata sekä omatoimista ohjelmaa yhdessä muiden kanssa. Illallisen voi nauttia kylpylän ravintolassa omakustanteisesti (etukäteistilaus ei tarpeen).

Sabato/Lauantai 14.9.2013

7.00 (ekde) Matenmanĝo kaj naĝado por tranoktanoj. *Aamiainen ja aamu-uinti hotellissa yöpyneille.*

9.30-10.30 Geologia pado, kie memstara promeno tra 2,3 miliardoj da jaroj. *Geologinen polku johdattaa 2,3 miljardin vuoden ajan.*

10.30 Bonvenigo al la jam surlokaj gastoj en la aŭlo de la naturcentro *Sinisimpukka/Blåmusslan* en Kasnäs, filmo (en la finna) pri la arkipelaga naturo. *Tapaaminen Sinisimpukan luontokeskuksen aulassa (kylpylän lähellä), suomenkielinen luontofilmii saaristosta.*

11.00 Vizito al arĝenta ateliero. *Vierailu paikal-*

lisen kultasepänilikkeen hopea-ateljeehen.

12.00 Ekveturo per ŝipo al la Vikinga Centro de Rosala, kie malfermo de la tagoj. *Lähtö lautalla Rosalan Viikinkikeskukseen, jossa päivien avaus.*

13.00 Lunĉo, konatiĝo kaj programo en la Vikinga centro. *Lounas ja tutustuminen Viikinkikeskukseen.*

16.00 Reveno al Kasnäs, tempo por naĝado kaj piedirado. *Paluu Kasnäsiin, aikaa uimiselle kylpylässä ja/tai kävelylle ympäristössä.*

19.00 Vespermanĝo. *Illallinen. Programo de Salo-klubo. Salon yhdistyksen järjestämää ohjelmaa.*

Dimanĉo/Sunnuntai 15.9.2013

8.00 (ekde) Matenmanĝo kaj naĝado por tranoktanoj. *Aamiainen ja aamu-uinti hotellissa yöpyneille.*

10.00 Podia diskuto pri aktuala temo de Esperantujo. *Paneelikeskustelu ajankohtaisista esperantoasioista.*

11.30 Lunĉo en Kasnäs. *Lounas Kasnäsin kylpylässä.*

12.30 Rondveturo per propra buso kaj kun esperantlingva ĉiĉeronado ene de Kimitoön. Tra Dalsbruk al bieno de Söderlångvik (hejmmuzeo de *Amos Anderson*), tie kafo kun dolĉa pano. Fine halto en centro de Kimito, kie vizito en la preĝejo. *Kiertoaajelu Kemiönsaarella, pääosin esperantonkielinen opastus. Vierailu Söderlångvikin kartanolla (Amos Andersonin kotimuseo), jossa pullakahvit.*

15.00 Centro de Kimito, kie vizito en la preĝejo. *Kemiön keskusta ja vierailu Kemiön kirkossa.*

15.30 Fermo de la tagoj. *Päivien päätös.*

Aŭtunaj Tagoj – Syyspäivät 14.–15.9.2013

Aliĝu jene:

- Elektu la plej konvenan paketon kaj plenigu al aliĝilon (aŭ skribu retroŝton). Informu se vi havas specialajn dezirojn, ekzemple pro alergiaj.
- Sendu la aliĝilon al la oficejo de EAF en Helsinki, aŭ aliĝu rete al adreso eafmendoj@esperanto.fi aŭ al tiina.kosunen945@gmail.com.
- Pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron en la aliĝilo.
- Notu! La uzo de referencnumero ŝparas de ni bankkoston. Aliĝilo necesas, ĉar la nura sumo ne rakontas al ni pri viaj deziroj.

Por demandoj estas je via dispo:

- Tuomo Grundström, Tiina Oittinen, Börje Eriksson kaj Carola Antskog (programo de la tagoj)
- Carola Antskog kaj Tiina Oittinen (praktikaĵoj surloke kaj pri vojaĝado)
- Tiina Kosunen (aliĝilo kaj pagoj)

Carola Antskog, cantskog@kolumbus.fi,
tel. +35850 581 7272

Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi,
tel. +35850 549 4709

La kontaktinformojn de aliaj vi trovos sur paĝo 2. Sekvu ankaŭ www.esperanto.fi por aktualaj informoj.

Ilmoittautuminen:

- *Valitse sinulle sopiva paketti ja täytä tiedot ilmoittautumislomakkeeseen tai kirjoita sähköposti. Kerro myös erikoistiveesi, esim. ruokavalion suhteen.*
- *Lähetä lomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai toimita vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi tai tiina.kosunen945@gmail.com.*
- *Maksa osallistumis- ja pakettimaksu ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille.*
- *Huom! Käytä viitenumeroa, jolloin säästät yhdistyksen pankkikuluja. Pelkän maksun perusteella emme voi päätellä mitä haluat, joten myös ilmoittautumistietojen lähettäminen on tarpeen.*

Lisätietoja saat meiltä:

- *Tuomo Grundström, Tiina Oittinen, Börje Eriksson kaj Carola Antskog (päivien ohjelma)*
- *Carola Antskog ja Tiina Oittinen (käytännön matkajärjestelyt)*
- *Tiina Kosunen (ilmoittautuminen ja maksut)*

Carola Antskog, cantskog@kolumbus.fi,
tel. 050 581 7272

Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi,
tel. 050 549 4709

Muiden yhteystiedot sivulla 2. Päivien ajankohdaiset tiedot liiton nettisivulla www.esperanto.fi.



Nova elektronika PMEG aperis

Lunde, la 10-an de junio 2013 aperis nova versio 15 de PMEG – Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko.

Sub la adreso www.bertilow.com/pmeg/ akademia Bertilo Wennergren disponigas tiun utiligan gramatikan helpilon kun multaj ŝanĝoj, plibonigoj, korektoj kaj kompletigoj.

(laŭ la lernu!-forumo)

Esperantolaboratorio en junulara karnavalo

Kulturkarnevalen estas finnlandsveda kulturkrea renkontiĝo por gejunuloj 13–19-jaraj. En la ĉi-jara festivalo en Lovisa (Loviisa) la 7an ĝis la 10a de novembro 2013 inter la elekteblaj kulturkreaj aktivaĵoj, t.n. laboratorioj, estos ankaŭ elektebla Esperanto gvidata de Anna Ritamäki-Sjöstrand.

La iniciato pri Esperanto aperis inter proponoj de partoprenintoj. La organizantoj

decidis realigi la proponon kaj unue trovis kontakton kun Börje Eriksson pro artikolo aperinta en *Medborgarbladet* "Gemensamt universellt språk är en nödvändighet" 2009 (la artikolo facile troveblas rete). Börje kontaktis min kaj mi kun ĝojo decidis akcepti la defion. La festivalo pagas salajron al la gvidantoj. Pliaj informoj en la svedlingva teksto.

AR-S

Esperantolabb på Kulturkarnevalen

KULTUR-
KARNE-
VALEN



LOVISA
2013



Kulturkarnevalen är ett årligt finlandssvenskt evenemang som samlar omkring 500 skolor, ungdomar från årskurserna 7–9, folkhögskolor, gymnasier, yrkesläroanstalter och svenska språkbudsklasser. I år arrangeras den elfte Kulturkarnevalen i Lovisa den 7–10 november 2013 – med esperanto på programmet. Alla deltagare väljer ett s.k. labb bland ett 30-tal alternativ. Discodans, parkour, stick- och virkgrafiti, jazz, trolleri, quidditch ... och som sagt esperanto.

Önskemålet om esperanto hade framförts av tidigare festivaldeltagare. Varje labb pågår fredag och lördag och festivalen avslutas med uppvisningar och presentationer. Deltagaravgiften är 50–60 euro och gratis transport arrangeras från deltagarnas hemorter. Anmälan öppnar den 7 september på www.kulturkarnevalen.fi och nästan alla platser brukar gå åt redan samma dag.

Så här (ungefär) kommer labbet att presenteras i broschyren som delas ut till skolorna:

LABBLEDARE *Anna Ritamäki-Sjöstrand* diskuterar familjeliv på esperanto med sin dotter i Mariehamn och ser fram emot Kulturkarnevalen, har lett Finlands esperantoungdomsförbund FEJO och Esperantoförbundet i Finland EAF, redigerat scouttidningen La Skolta Mondo och ordnat konserter med esperantoartister.



FÖRHANDSUPPGIFT

1) Titta på första lektionen av kursen "Ana Pana" på Youtube (direktlänk på kulturkarnevalen.fi) och skriv sedan vad du själv heter (Mitt namn är...) på esperanto till anna.ritamaki@esperanto.se. På sv.lernu.net finns även andra kurser.

2) Fråga någon vänen vad de (tror sig) vet(a) om esperanto.

ESPERANTO Skapa dina egna ord på ett språk som är allas och ingens, utsprunget ur ett projekt på 40 sidor för 126 år sedan och fullt levande runt om i hela världen. Esperanto är strikt regelbundet och fullt av frihet så kom och lär dig regler och överskrid gränser.

Anna Ritamäki-Sjöstrand

Allan Mehtonen

In Memoriam 26.6.2012

Unu jaro pasis post la morto de *Allan Mehtonen*, kiu longe estis la vaste konata kaj honorita prezidanto en mia hejmurba Esperantoklubo en Oulu. Tiun tagon mi certe neniam forgesos. Por mi estis tago de demandoj sen respondoj. Tiam okazis, ke mi sentis, ke tute hazarde mi estis ĝustatempe ĝustaloke, sed la kaŭzo eble estis tute alia ol mi intencis. Jen ĉi-tiaj aferoj okazis. Jam antaŭ longe ĉiuj kontoj estis akceptitaj en kunvenoj. Tamen je 26.6. mi kiel kasistino pensis, ke mi volus havi ie en la kontolibro ankaŭ subskribon de Allan. Li estis ankoraŭ membro de la estraro, sed vivis en hejmo de maljunuloj. Unue mi telefonis al lia filino, sed neniu respondis. Do, mi komencis studi autobusojn kaj sciis, kiel eblas veturigi al lia urboparto, konata loko. Nia klubo iam jam vizitis lin. Tie tamen mi vidis multe da konstruaĵoj kaj devis demandi pri la vojo, serĉi kaj demandi denove kaj serĉi, iri al pordo, kiu estis ŝlosita, iri al sekva pordo, kiu estis ŝlosita ktp. Finfine mi estis ĉirkaŭinta la tutan grandan areon antaŭ ol trovi la eniron. En la granda domo mi trovis flegistinon por demandi pri la ĉambro de Allan. Ŝi foriris. Poste ŝi venis kaj diris, ke li ne estas tie kaj ŝi ne havas la rajton doni nomojn!

Poste denove serĉado de sekva flegistino, kiu foriris kaj revenis gvidante min al la ĝusta parto de la domo. En la halo mi rigardis ĉirkaŭ mi por rekonii la lokon. Venis iu flegistino por demandi, kiun mi serĉas. Al mia peto pri subskribo de Allan ŝi diris, ke tio ne sukcesas. Al mia propono ke li povus nur meti markon kaj ŝi povus atesti, ke estas la ĝusta persono, ŝi denove diris same. Nur

nun mi demandis, kiel li fartas. Ŝi demandis, ĉu mi estas lia familiano. Jam pasis la tago ĝis malfrua posttagmezo. Mi fiksrigardis ŝin kaj staris kiel ŝtono inter vasta duparta pordo sur mia dekstra flanko kaj lifto sur mia maldekstra flanko. Ne, mi ne estas familiano, mi aŭdis min respondi. Ĝuste dum tiu preciza sekundo malfermiĝis la blanka duparta pordo sur mia dekstra flanko kaj kvar nigravestitaj viroj kun blankaj ĉemizoj puŝis iun sur brankardo tute kovrita kun bela, brila, griza teksaĵo en lifton for. Sen bone kompreni, kio estas okazanta, mi sentis larmojn fali sur miaj vangoj kaj dankis ŝin pri bona prizorgado de Allan, eĉ tiel bona, ke ili lernis Esperanton por povi tiel ĝojigi maljunulon per kelkaj vortoj kaj salutoj.

Hejme mi denove telefonis al lia filino. Ŝi asertis, ke fakte estis Allan, kies foriron mi vidis. Ŝi estis estinta ĉe sia patro ĝis la fino kaj pro tio ne povis respondi al mia telefonado antaŭtagmeze. Nia klubo estis festinta lian 90-jariĝon en lia bela domo kaj nun la entombigo okazis nur inter familianoj. Esperanto estis heredaĵo el la gepatra hejmo al li. Ĝi estis lia edzperanto. Ĝi estis lia ĝojo kaj lia vivo. Tie en la halo mi staris kun mia kontolibro kaj skribilo tute labortagvestita kaj rigardis lian lastan foriron sub miaj okuloj. Eble oni povas diri, ke tio tamen estis kvazaŭ honorigo al Allan, vivlonga, aktiva Esperantisto, talenta skribanto, tradukisto de kantoj, redaktoro de Signalo, koro de nia klubo en Oulu.

Eila Martin

Doktoro Fiŝer rakontas

Jen eble ankaŭ por vi stimula legaĵo el la libro
 ”Rakontu, Samideano” (Dansk Esperanto-Forlag, 1966) ...

Mi estis vojaĝanta en la proksima oriento, kaj mi prenis sidlokon en la restoracia vagono de Bukaresto al Konstantinoplo. Apenaŭ mi estis sidiginta, kiam mi vidas, ke iu eksterlandano vane penas komprenigi al kelnero, kion li deziras. La kelnero uzas sian tutan lingvoscion: li parolas rumane, serbe, turke, bulgare kaj ruse. Sed ĉiam sen sukceso. La fremdulo ne komprenas eĉ unu vorton. Mi alproksimiĝas en la deziro helpi al li – krom la rumana mi parolas sep lingvojn – kaj mi demandas lin germane, france, angle, itale, hungare, hispane kaj greke, ĉu mi povas servi al li. Ĉio vane. La fremdulo ne komprenas iun el la dekdu lingvoj. Tiam mi ekmemoris artikolon pri Esperanto, kiun mi legis antaŭ kelka tempo en gazeto, sed al kiu mi tiam ne turnis atenton, kaj mi finis per la demando:

– Ĉu vi parolas Esperanton?

– Jes, mi parolas, li respondis kun ĝojkrio. Kaj

li daŭrigis per la sama lingvo, kiun mi miaparte tute ne komprenis, ĉar tiu estis la sola frazo de Esperanto, kiun mi konis. Sed kiam la fremdulo rimarkis, ke mi nenion komprenas, li sciis bonan rimedon. Li donis al mi ”Ŝlosilon de Esperanto”, kiaj ekzistas en multaj lingvoj. Kvankam ĝi estas nur malgranda kajereto, ĝi enhavas la gramatikon kaj sufiĉan vortaron de la internacia lingvo.

Mi tuj komencis studi la libreton, kaj post dek horoj, kiam mi estis sur ferdeko de ŝipo, mi jam provis paroli en Esperanto. Tiam mi ricevis la informon, ke mia kunvojaĝanto estas finno kaj scias kvar lingvojn, la svedan, danan, norvegan kaj finnan.

Ni tri, la finno, la kelnero kaj mi, parolis kune dek ses lingvojn, kaj tio tamen ne sufiĉis por ke ni komprenu unu la alian. – De tiu tempo mi estas fervora esperantisto.

Vilho Setälä

La spirito de Orivesi Instituto atendas vin Oriveden Opiston henki odottaa sinua

Somera kurso 8.–12.7.2013

La spirito de la Instituto vivas en la ĉarma lageto en la parko de la Instituto. Vi povos senties efikon dum la somera Esperantokurso, se vi aliĝos baldaŭ. Restas nur kelkaj tagoj por sinanongi, la limdato estas la 14-a de junio, sed indas informiĝi ĉe Sylvia ankaŭ poste.

Aliĝu rekte en Oriveden Opisto

www.orivedenopisto.fi, orivedenopisto@kvs.fi,
 Koulutie 5, 35300 Orivesi, tel. 020 7511 511
 Detalaj scioj troviĝas en www.esperanto.fi,
www.esperanto.fi/elfi. Vi povas ricevi la sciojn ankaŭ surpapere, se vi petas de Sylvia.
 Sylvia Hämäläinen sylvia.h@kolumbus.fi,
 tel. 050 321 4313, F.E. Sillanpään katu 2 C 46,
 33230 Tampere
 Tiina Oittinen eafsekretario@esperanto.fi,
 tel. 050 549 4709

Esperanton kesäkursi 8.–12.7.2013

Opiston henki elää puistolammessa opiston pihassa. Voit kokea sen vaikutuksen esperantokurssilla, jos ilmoittaudut pian, sillä päiviä ei ole jäljellä montaa enää. Viimeinen päivä kirjautua on 14.6., sen jälkeen kannattaa olla yhteydessä Sylviaan tai Tiinaan ja kysyä kurssin tilannetta.

Ilmoittaudu suoraan Oriveden Opistoon

www.orivedenopisto.fi, orivedenopisto@kvs.fi,
 Koulutie 5, 35300 Orivesi, puh. 020 7511 511
 Tarkat tiedot löytyvät www.esperanto.fi,
www.esperanto.fi/elfi. Saat vaikka paperilla nämä asiat ottamalla yhteyttä Sylviaan.
 Sylvia Hämäläinen sylvia.h@kolumbus.fi, puh.
 050 321 4313, F.E. Sillanpään katu 2 C 46,
 33230 Tampere
 Tiina Oittinen eafsekretario@esperanto.fi,
 puh 050 549 4709

Forpasis d-ro Werner Bormann (1931–2013)



Werner Bormann, doktoro pri ekonomiko kaj unu el la plej gravaj gvidantoj de UEA dum la lastaj jardekoj, forpasis la 16-an de majo en sia hejmurbo Hamburgo. Li naskiĝis en Berlino la 27-an de oktobro 1931.

Bormann lernis Esperanton post la dua mondmilito. Li estis prezidanto de Germana Esperanto-Asocio 1967–1977 kaj reprezentis ĝin en la Komitato de UEA 1967–1995. Li gvidis la Lokan Kongresan Komitaton de la 59-a UK en Hamburgo en 1974. De 1971 ĝis 1980 li estis estrarano de UEA; 1974–1977 kiel vicprezidanto kaj 1977–1980 kiel ĝenerala sekretario. De 1992 ĝis 1995 li membris en la Financa Komisiono de UEA. En 1993 Werner Bormann fariĝis Honora Membro de UEA.

Bormann estis membro de la Akademio de Esperanto 1976–2007 kaj en la periodo 1995–1998 ĝia prezidanto. Li estis ankaŭ orda profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino. Dum longa tempo li gvidis Germanan Esperanto-Instituton kaj instruis Esperanton en la Universita-

to de Hamburgo. De 2000 ĝis 2005 li estis prezidanto de FAME-fondaĵo. Dum jardekoj li aktivis ankaŭ en Hamburga Esperanto-Societo, kiu elektis lin sia honora membro en 2004.

Bormann estis aktiva preleganto kaj aŭtoro. Inter liaj verkoj pri lingvaj, lingvopolitikaj kaj movadaj temoj elstaras la prelegaro "Bona ŝanco" (1971) kaj "Die Hamburger Interlinguistik-Vorlesung" ("La Hamburga interlingvistika prelego", 1995). Kun *Helmar Frank* li publikigis "Por plurlingveco de Europon" (1994). Kiel ekonomikisto li verkis i.a. "Mondkomerco kaj lingvo" (1993). Registraĵoj de liaj prelegoj en Hamburga Esperanto-Societo, "Mia Esperanto-vivo" kaj "Zamenhof – pola humanisto", aperis kompaktdiske en 2004.

Por Werner Bormann Esperanto estis ankaŭ familia afero. Lia patro *Artur Bormann* estis konata interlingvisto kaj ankaŭ Honora Membro de UEA. Lia edzino *Elsbeth Bormann*, kiu mortis en 1996, estis elstara movadano, i.a. kiel prezidanto de Germana Esperanto-Asocio; ankaŭ iliaj du gefiloj fariĝis esperantistoj kaj aktivis en la junulara movado.

(laŭ GK 500)

Eventokalendaro de EAF

2013

- 8.–12.7. Esperantokurso en Orivesi-Instituto
- 20.–27.7. UK en Rejkjaviko, Islando
- 19.–26.8. Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Nazareto, Israelo
- 14.–15.9. Aŭtunaj Tagoj en *Kasnäs, Kimitoön*
- 15.12. Zamenhof-festo

2014

- marte Vintraj Tagoj en *Turku*
- 26.7.–2.8. UK en Bonaero, Argentino
- septembre Aŭtunaj Tagoj en *lissalmi*

2015

- marte Vintraj Tagoj en *Tampere*
- julie la 100-a UK en Lillo (Lille), Francio

Esperanto-societo Antaŭen agadas

- 3.6.–26.8. Someraj renkontiĝoj en la kafejo de la ĉefbiblioteko Metso lunde je la 17–18
- 8.7.–12.7. Somera kurso en Orivesi
- 09.09. je la 17.00 Septembra vespero
- 11.09. je la 11.30 Esperanto-klubo de Antaŭen
- 07.10. je la 17.00 Oktobra vespero
- 04.11. je la 17.00 Novembra vespero
- 18.11. je la 17.00 Elektokunveno
- 16.12. je la 17.00 Zamenhof-vespero

Bv. vidi pliajn informojn ĉe la retejo
www.esperanto.fi/tampere

Ĉu "Esperant-" aŭ "esperant-"?

Demando al la Konsultejo de la Akademio de Esperanto (8.8.2012)

La formo "Esperant-" (la lingvo Esperanto) aperas foje majuskle, foje minuskle, eĉ ambaŭ en la sama artikolo. Kio estas la normo pri tio ĉi?

Respondo, publikigita la 11an de Septembro 2012 de Aleksandro Shlafer

Kara samideanino,

Unue, la senpera kialo, ke oni kutime skribas la vorton "Esperanto" majuskle estas tio, ke ĝi estas propra nomo. Se tio ne estas al vi evidenta, tion konfirmas la fakto, ke ĝi kondukas (ekzemple, rilate kombineblon kun la artikolo) same kiel ceteraj propraj nomoj.

Tamen pluderivado deiranta de la radiko "Esperant-" ne ĉiam kondukas tute same kiel "ordinaraj" propraj nomoj: ekzemple, ĝi kutime retenas la majusklon eĉ en adjektiva kaj adverba formoj, kio ne estas kutima afero.

Grava specifaĵo de la radiko "Esperant-" en Esperanto estas tio, ke (pro konataj historiaj cirkonstancoj) ĝi estas homonima kun la kombino "esper-ant-".

Tia homonimeco etendiĝas al multaj derivaĵoj: Esperanto/esper-anto, Esperanta/esper-anta, Esperante/esper-ante.

Ambaŭ formoj en tiaj paroj estas reale uzataj kaj ilia miksado povas konduki al miskompreno. Kelkaj inter konsultejanoj opinias, ke oni tradicie distingas tiajn formojn skribe uzante "Esperant-", kiam temas pri la lingvo, kaj "esperant-", kiam temas pri esperado.

Mi mem, neniam leginte pri tio ĉi, malkovris por mi tiun ĉi distingon en fruaj jaroj de mia esperantisteco kaj konscie ekuzis tian kriterion por decidi, ĉu necesas reteni la majusklon ĉe derivaĵoj de "Esperant-" aŭ ne. Tio ŝajnis tute konforma kun la reale uzataj formoj en la lingvaĵo de "bonaj aŭtoroj", kio plifirmigis mian konjekton, ke temas ne pri mia arbitra invento, sed pri malkovro de nesribita, sed reale valida kriterio.

Kelkaj derivaĵoj de "Esperant-" apenaŭ povas

konduki al iu ajn miskompreno, kaj tial oni kutime skribas ilin minuskle: "esperantisto", "esperantismo", "esperantisteco", "esperantaĵo" estas evidente tiaj, kaj probable ankaŭ "esperantigo", k.a.

Estas notinde, ke la ofte uzata neformala mallongigo de "Esperanto-" aŭ "Esperant-" al unu-litera "E" kutime estas majuskla: "E-o", "E-e", "E-igo", "E-aĵo", "E-klubo", "E-movado", ktp.

Bonvolu noti, ke kelkfoje la sencodistingo per majusklo estas aŭ entute neuzebla (ekzemple, kiam oni parolas) aŭ estas neoportuna (ekzemple, enmeto de majusklo meze de vorto: "ne-Esperanta litero" anstataŭ la kutima "neesperanta").

Resume

La nomon mem de la lingvo oni normale komencas majuskle, kiel propran nomon: "Esperanto".

En derivaĵoj, se ekzistas neniu risko de konfuzo inter "Esperant-" kaj "esper-ant-", oni kutime uzas minusklon. Se tia konfuzo eblas, oni povas distingi la homonimajn formojn per majusklo/minuskle.

Evidente temas ne pri gramatikaj reguloj, sed pri klareco, bona stilo kaj respekto al tradicio. Aparte gravas ankaŭ unueco ene de la sama teksto.

*Amike,
-Aleksandro*

*Alexander Shlafer, Direktoro de la Konsultejo
de la Akademio de Esperanto*

*(<http://akademio-de-esperanto.org/konsultejo/>
– Tio ĉi estis publikigita en la kategorio Respondo de la Konsultejo.)*

Ekskurso al Korkeasaari

Fotoj kaj raporto laŭ *Sakari Kauppinen*,

<http://esperantohelsinki.wordpress.com/2013/05/20/vizito-al-korkeasaari-ii>

Korkeasaari havas bestojn el diversaj partoj de la mondo, sed ĉefe rarajn protektendajn speciojn. Tamen bestoj ne estas nur en kaĝoj, interesaj estas ankaŭ la sovaĝaj birdoj nestantaj en tiu

insulo. Inter ili estas blankvanga ansero, birdo kiu antaŭ dudeko da jaroj estis liberigita ĝuste ĉi tie. Post tio ili tiel pliiĝis ke kelkaj homoj jam sentas sin ĝenitaj.



Unu el niaj celoj estis mongolia sovaĝa ĉevalo (pjevalski ĉevalo). Ĉi-jare ili havas du idojn.



Jen blankvangaj anseroj nestantaj en Korkeasaari. La ino verŝajne jam havas ovojn. La virbesto kontrolas la ĉirkaŭaĵon kaj forpelas ĉiun kiu tro proksimiĝas.



Alia sovaĝa birdo kiu eknestis en Korkeasaari – hematopo (marpigo). La foto estas farita en kaĝo de aziaj hufuloj. Se vi rigardas atente, vi povas vidi, ke en la nesto jam estas unu ovo. Espereble la hufuloj ne surtretos la neston.



Moskobovo (ovibovo) estas eŭropa mamulo, kiu praktike malaperis en la naturo, sed same kiel la mongolia sovaĝa ĉevalo, konserviĝis en bestoĝardenoj kaj estas reenkondukita en la naturon.



Jen mamuloj venintaj de tre malproksime. Por finnoj tiu-speciaj bestoj ĉiuj estas kanguruoj, sed pli precize tiu ĉi estas valabio.



Pavoj libere vagadas en la bestoĝardeno. Ili facile saltas super la barilojn. Se vi estas bonŝanca, vi povas vidi kiel virpavoj eletendas sian voston.

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- ♦ Jyväskylän Esperantokherho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202 kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. www.esperanto.fi/tampere (Jukka Laaksonen: jvaleto@kolumbus.fi ☎ 050 5829 248)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi ☎ 050 5494709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset

hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). esperarto@phnet.fi.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä. Lisätietoja: Jorma Toropainen, puh. 040 7510535, s-posti jormato35@gmail.com.

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2013

Nro	Limdato	Aperas
4/2013	1.9.	en septembro
5/2013	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:
eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Maailma kylässä 2013

La 25-an kaj 26-an de majo okazis en *Kaisaniemenpuisto*, en Helsinko *Maailma Kylässä* (la mondo en la vilaĝo), kie same kiel pasintjare FEJO havis propran prezenttablon por Esperanto.

Sur la tablo estis ekzemple esperantaj gazetoj, lernlibroj kaj La Mastro de L' Ringoj. Tiun lastan aĉetis unu ne-(ankoraŭ)esperantista knabo. Ankaŭ esperantlingvaj muzikaj diskoj, lernlibroj kaj komiksoj interesis vizitantojn. Ofta reakcio de homoj, kiuj haltis ĉe nia tablo, estis: "Esperanto estas tiu morta lingvo"; nur kelkaj sciiis, ke la esperanta movado estas ankoraŭ sufiĉe aktiva. Demandoj, kiujn ni ankaŭ ofte aŭdis, estis "Al kiu lingvo Esperanto similas?", "Kie plimulto de la hodiaŭa esperantistoj loĝas?" kaj kelkaj ŝatis scii, ĉu estus eble lerni Esperanton en Helsinko. Tion ni bedaŭrinde devis respondi tiel, ke nuntempe ne ekzistas lerngrupo en Helsinko. Espe- reble venontjare ni povos reklami pri instruado de Esperanto en Helsinko.

En du tagoj ni disdonis preskaŭ cent reklam- kartojn de la lernu!-paĝaro kaj infompaperojn pri Esperanto, kie eble la plej interesaj aferoj estis esperantaj frazoj kaj vortoj kun finna traduko.

Surprizo estis, kiom multe da homoj interesiĝis aĉeti esperantajn komiksojn, sed nature oni povas kompreni pli facile komiksojn ol senbildajn librojn.



Prezenttablo, kun Päivi Saarinen, Paula Niinikorpi kaj Tuomas Latva-Pirilä.



Keith Uber kaj Tiina Kosunen. Foto: Tuomas Latva-Pirilä

Rezulte la dutaga aranĝo estis sukcesa, kaj ni jam eltrovis ideojn por venonta jaro. Dankon al ĉiuj esperantistoj, kiuj deĵoris en Maailma Kylässä!

Tuomas Latva-Pirilä

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy syyskuussa. Aineisto 31.8.2013 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en septembro. Artikoloj ĝis 31.8.2013 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.